



CsEK ne estas ĝia membro. Tio povos okazi nur kiarn ni havos firman tutŝtatan organizaĵon. Tamen nia kunlaboro povos esti jam nun efika, ĉar prezidanto Jos. Ed. Ambrož estas gvidanto de Sekcio sociale sanitara ĉe UEMA kaj vicprezidanto Dro Izák eĉ sekretario Dro Hradil fakdelegitoj de UEA. La faka programo konsistis el prelegoj (krom la unua kun diapozitivoj). 1. Dro Mužík el Kladno prezentis la tradukon de la artikolo de Dro Růžička kaj Bartoníček :

"Pseudoulcera sindromo."

2. D-ro Petro Zlatnar el Ljubljana prelegis pri "Antigenoj de la buĉa flaŭro en la denta pulpo.

3. D-ro Jerzy Birczynski, promociita pediatro el Krakovo prelegis je la temo : "Planado de la familio laŭ la termika metodo Palmer-Holt"

4. Anna Musilová ĉeflegistigo al; Poděbrady, banloko en Bohemio, prelegis pri "Venenaj fungoj" (ankaŭ kun koloraj diapozitivoj).

Ĉiuj prelegoj estis altnivelaj kaj vekis ne nur intereson, sed ankaŭ diskutojn. Precipe vigle diskutis D-ro Wiersbitski (vierzbicki) el Greifswald, GDR. Pro tempomanko (la kunveno daŭris 3 horojn), D-ro Jozefo Hradil koncize informis pri la ĝisnunaj agado kaj varbado. El inter 70 konataj ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistaj medicinistoj aliĝis 32 krom kelkaj kunlaborantoj, kiuj ankoraŭ ne sendis aliĝilon. Krome li parolis pri la eblecoj de kunlaboro kun Ruĝa Kruco, pri la neceso eldonadi informilon kaj pri la fakterminaro de D-ro Albaŭlt, gvidanto de Medicina Terminologia Centro de UMEA. D-ro Černý el Litoměřice kaj D-ro Hradil kompilis Ĉeĥan Esperantan Medicinan Vortaron, sed ne estas mono por ĝin eldoni. Do ĝi servos almenaŭ kiel helpilo ĉe la unuaj fakaj tradukoj. Ĉiuj partoprenintoj ricevis la resumojn de la prelegoj kaj la 2-an numeron de ĉi-jara Esperanto-Agado, informilo pri Esperanto-rondeto en Martin, Slovakio kun recenzoj pri du libroj de D-ro Hana Selye: „Vivo kaj streso“ kaj „Kiel fariĝi sciencisto“, el la plumo de Inĝ. Ivan Slávik kaj kun la artikolo de D-ro Ludoviko Izak „Esperanto kaj scienco“, pri la obstakloj, kiujn devas fronti la medicinistoj klopodantaj enkonduki Esperanton en la ĝeneralan uzon en sciencoj...

La ĉeestintoj dankas al la Direkcio de Urba Hospitalo en Opava pro la disponigo de la kunvenejo kaj projekcia aparato, same kiel pro la bongusta refreŝigo kun ĉiuj partoprenintoj, kvankam origine ni kalkulis nur pri la ĉeesto de 11 personoj.

Ekskurso el Ostrava. Ok medicinistoj kunvenintaj en Opava veturis la sekvan tagon en la najbaran urbon Ostrava. Ili vizitis la anesteziologian apartenaĵon de Urba Hospitalo kun „hiperbara kamero“. Ĝi estas fermita ĉambreto cilindroforma, kie la malsanuloj sidas kaj kien superpreme estas enkondukata aero ĝis 2 atmosferoj. La pacientoj enestas dum 2 horoj kaj estas kuracataj pro diversaj oksigenmankaj malsanoj. Tiu ĉi metodo senkonkurence kaj rapide savas la venenigitaj per karbonoksido (CO), efikas ankaŭ ĉe certaj grandaj kontuz-vundoj, kor-operacioj, obliteraj malsanoj ktp. La vizitintoj persone spertis unu sidon kaj aŭskultis la interesajn klarigojn de la lokaj specialistoj en esperanta traduko. (Interesuloj skribu al D-ro Jozefo Hradil, Český Dub 137/III, okres Liberec, Ĉeĥoslovakio).

Ekspozicion pri ĉeĥoslovakaj kuracaparatoj kaj medikamentoj de la firmao Spofa aranĝis dum la kunveno en Opava la sekretario kun helpo de s-ano Bartovič. La propagandmaterialo (esperantigita) daŭrigis la vojon al la kunveno de UMEA en Rotterdamo.

Redaktis kaj tajpis D-ro Ludoviko Izak

OKSM 2090-2099/634/67 V-15x71433